

LA JUNA VIVO

MONATA ORGANO
POR LA

JUNULARO KAJ
KOMENCANTOJ



Redakcio kaj Administrado:
West-Graafdiijk (N.H.)
Nederlando.
Gironumero 209354 Nederlando.
Tel. 10

Jarabono:
Nederlando: 0.75 guldeno
Aliaj landoj: 1 guldeno
(1 gld. = 2,1 Sv. fr. aŭ 10 fr. fr.)

Por progresintoj

JOCJO LA MUZIKANTO.

Li naskiĝis malforta, eta. Oni timis, ke li mortos tuj post la naskiĝo, sed ne okazis, tre, tre malrapide la knabeto kreskis.

Li estis malgrasa, la ventro pufa kaj la vangoj kavaj; tufoj da lin-koloraj haroj pendis antaŭ liaj okuloj aŭ staris rekte, malorde sur la kapo; lia rigardo estis klara kaj pensema.

En la vintro li sidadis ĉe la forno, mallaŭte plorante pro malvarmo kaj malsato, ĉar la patrino ofte havis nenion por kuiri.

La patrino, malriĉa laboristino, vivis de tago al tago, kiel la hirundoj. Eble ŝi amis Joĉjo-n, tamen ofte batis lin.

Okjaraĝa li kelkfoje paŝtis la brutaron, aŭ, se tute mankis nutraĵo, li serĉis fungojn en la arbaro.

Li estis ege timema, ĉiam preta meti fingron en la buŝon, kiam iu alparolis lin. Neniu kredis, ke li grandiĝos, kaj ankoraŭ malpli oni supozis, ke li iam ajn povos vivteni sian patrinon. Por nenio li taŭgis. Nur la muzikon li amis. De kiam li estis alta kiel tablo, li pensis nur pri muziko.

Okazis ofte ke li, paŝtante la bovojn en la arbaro, kunportis korbeton por kolekti berojn, sed plurfoje li revenis kun malplena korbeto, dirante al la patrino: „Se vi scius, patrino, kio estis en la arbaro! Estis io kantanta.....!” Tiam li estis gaja, sed la patrino koleris: „Atendu, mi igos vin kanti! Ne timu.....!” Kaj ŝi donis al li muzikon per la supkulerego. La etulo kriis, ploris, promesis ke li ne plu faros, tamen malgraŭ ĉiuj batoj, li multe pensis pri la mirinda muziko de la arbaro..... la fagoj, la betuloj, la belaj merloj, la tuta arbaro kantis! Vespere li aŭskultis la milojn da so-

noj de la kamparo, dum la tero dormis. En la vilaĝo oni nomis lin „Joĉjo, la muzikanto”.

Printempe li migris laŭ la bordo de la rivero kaj tranĉis branĉojn de salikoj por fari flutojn. Nokte, dum la ranoj ĥore kvakis kaj kelkaj birdoj kantis en la malseka herbo, li atente aŭskultis, kaj nur Dio scias, kian harmonion li trovis en tiu susurado. La policisto, nokte trairante la vilaĝon, ofte vidis la blankan ĉemizon de Joĉjo, kiu ŝtelire proksimiĝis al la muzikfesto; kaŭre li eksidis sub la malfermita fenestro kaj serioze aŭskultis dum la gejunuloj dancis. Kaj kiam violono kun ege delikata voĉo kantis: „Ni manĝu, ni trinku kaj estu gajaj!”, li mallaŭte, sincere ripetis: „Ni manĝu, ni trinku kaj estu gajaj!” Ho, kiom li donus por violono, kiu kantas tiom delikate! Kiel havigi al si tian violonon? Kiu faras ĝin? Se li nur rajtus teni ĝin en la manoj, nur momenteton por vidi kiel ĝi estas farita. Sed li ne pensu pri tio, li kontentigu sin per aŭskultado.

Kaj li aŭskultis seninterrompe ĝis li aŭdis la voĉegon de la policisto: „Ĉu vi ne iros dormi diableto?” Nudpiede li ŝteliris hejmen dum la gaja rekanto de la violono kun la grava basvoĉo sekvis lin en la mallumon: „Ni manĝu....” Kiam li okaze de edziĝ- aŭ rikolt-festo aŭdis violonon, estis por li feliĉa tago: poste li sidiĝis apud la forno kaj diris nenion dum tutaj tagoj. Li sukcesis konstrui violonon el bretoj kaj ĉevalharoj, sed la instrumento ne havis tian belan sonon kiel tiu en la festo. Ĝi vibris mallaŭte, ne pli laŭte ol la muŝoj zumas. Li tamen gratis sur ĝi de la mateno ĝis la vespero, kvankam li pro tio ricevis multajn batojn. Ĉiutage lia ventro pli pufigis. La hararo ĉiam malorda, la grandaj okuloj ofte plenaj de larmoj, kavaj la brusto kaj vangoj, lia aperaĵo kaŭzis kompaton. Li ne estis kiel aliaj knaboj: li similis sian violonon el bretoj, kiu apenaŭ spiris. Antaŭ la rikolto li terure malgrasiĝis, pro tio ke li nutris sin preskaŭ nur per krudaj karotoj kaj ankoraŭ pli pro sia dezirego posedi violonon. Sed tiu deziro, kiom ajn ĝusta ĝi estis, portis al li nenian bonon. Servisto en granda bieno posedis violonon, kiun li ludis vespere por plezurigi la servistinojn. Joĉjo multfoje rampis tra la arbustoj por veni sub la malfermitan fenestron de la subtera ĉambro, de kie li facile povis rigardi la faman violonon. La tuta animo de la bubo speguliĝis en la okuloj. Li tamen ne kuraĝis tuŝi ĝin, ĉar por li ĝi estis sankta.

Iun vesperon estis neniu en tiu subtera ĉambro. La mastro foriris kaj la servisto troviĝis en alia parto de la domo, kie li agrable ba-

bilis kun servistino. Joĉjo, kaŝita en la arbustoj, admiris tra la parte malfermita pordo la subjekton de siaj ardaĵoj. La plenluno lumigis la ĉambron kaj desegnis sur la plankon grandan blankan kvadraton, kiu, levigante iom post iom, baldaŭ metis la violonon en hela lumo. Sur la malluma fono de la resto de la ĉambro, la violono ŝajnis esti el arĝento, ĝiaj konturoj estis tiel bone lumigitaj, ke Joĉjo palpebrumis. Ĝuste pro la lumo de la luno ĉio distingiĝis bonege: la flankoj entrancitaj, la kordoj, la prenilo, la streĉiloj, kiuj aspektis kiel lumetoj. Sube pendis la arĉo, kiu similis arĝentan arkon. Ho, kiom bone li vidis ĝin! Mirinde ĝi estis! Joĉjo, ĉiam pli tentata, surgenue kaŝita en la arbustoj, la lipoj duonmalfermitaj, rigardis kaj rigardis. Timo retenis lin, sed nekontraŭstarebla forto puŝis lin antaŭen. Ĉu estis sorĉo? Ŝajne la violono alproksimiĝis, antaŭenstreĉis al li sian lignan kolon, kvazaŭ ĝi dezirus, ke li kaptu ĝin..... De temp' al tempo ĝemis la vento, susuris la arbofolioj, murmuris la arbusto, kaj Joĉjo aŭdis flustri en sia orelo: „Eniru, Joĉjo, en la ĉambro estas neniu! Eniru, Joĉjo!.....”

La nokto estis hela: en la ĝardeno, proksime al la lageto trilis la kanto de najtingalo, persvade ripetante: „Eniru, eniru do!”

La violono radiis denove, la bubo alproksimiĝis... malrapide..., dum la najtingalo ankoraŭ lastan fojon per dolĉaj tonoj instigis: „Eniru, Joĉjo, eniru!” La ĉemizeto ĉiam pli proksimiĝis al la malfermita pordo. La nigraj arbustoj ne plu kaŝis lin. La knabo staris spiregante sur la sojlo, kun batanta koro. Ankoraŭ momenton..... kaj la blanka ĉemizeto malaperos en la ĉambron..... sur la sojlo ne restis pli ol unu nuda krureto, tute tremanta..... La ĉemizeto malaperis..... Estas senutile, ke strigo avertas: „Ne, ne!” La ranoj en la lageto kvakis pro timo, kvazaŭ surprizitaj, poste silentis, kaptitaj eble pro pli granda timo. La najtingalo ĉesis sian kanton, la arbustoj ne plu moviĝis. En tiu momento Joĉjo singarde rampis antaŭen, malrapide, sed subite ankaŭ lin kaptis timo. En la arbustoj li estis kvazaŭ en propra hejmo, kiel sovaĝa kato en arbaro; nun li sentis sin en kaĝo. Rapidis la movoj, li spiris malfacile, timis la mallumon. Fulmobrilo fendis la ĉielon kaj lumigis la internon de la ĉambro. Joĉjo kaŭris antaŭ la instrumento, la kapo levita al la violono; sed la fulmo ĉesis, la luno kaŝis sin malantaŭ la nuboj; li aŭdis kaj vidis nenion. Eta bruoj plende ekvibris tra la mallumo, kvazaŭ iu tuŝetas la kordojn de la violono, kaj samtempe raŭka kolera voĉo en angulo de la ĉambro ekkriis: „Kiu estas tie?” Aŭdiĝis la froto de alumeto sur la muro: la ĉambro heliĝis..... Ho,

Dio! Aŭdiĝis malbenoj, frapoj, singultoj de la knabo, aliu kriis: „Ho, Dio, Dio!“..... La hundoj ekbojis, lumoj rapidis tra la tuta domo: estis vera konsterniĝo.

La sekvan tagon Joĉjo staris antaŭ la juĝisto kaj la vilaĝestro! Ili devis puni lin kiel malgrandan krimulon. La du viroj rigardis la bubon, kiu konsternita, la malpura fingreto en la buŝo, tute ne komprenis kion ili deziris de li, kial oni kondukis lin antaŭ tiuj du viroj.

Kial kondamni tian kompatindan knabon? Li ankoraŭ ne havis dek jarojn kaj staris apenaŭ rekte sur la kruroj. Sendi lin en malliberejon? Diablo, oni ja devas kompati infanojn! La policisto prenu lin kaj donu al li kvar batojn: estonte li estos pli saĝa, ne plu kuraĝos ŝteli. Oni vokis Staŝio'n, la policiston. „Forkonduku lin, kaj donu al li tiom, ke li rememoros!“ Staŝio malsaĝe kaj sovaĝe skuis la kapon, metis Joĉjo'n sub sian brakon kaj portis lin en la kabanon. La knabo, aŭ ne komprenis, kion Staŝio intencis, aŭ tro miris: li diris nenion, nur rigardis al Staŝio per rigardo de vundita alaŭdo. Ĉu li sciis, kio okazos al li?

Metinte lin sur la teron, Staŝio eklevis lian ĉemizeton kaj igis sibli la vergon preter liaj oreloj. Nur tiam Joĉjo ekkriis: „Panjo, panjo!!!“ Ĉiufoje, kiam la vergo senkompate refalis sur la mizeran korpeton de la knabo, li ekkriis: „Panjo!“, sed ĉiam pli mallaŭte, pli malforte. Ne estas konate je la kioma bato li silentis kaj ne plu vokis sian patrinon. Mizera violono rompita.

Ho, bestaĉo, fripono, Staŝio! Kiu batas tiele infanojn?? Li estis ja tiom malforta, tiom malgranda, vivis ja apenaŭ!

La patrino alvenis, prenis la kreitaĵon kaj portis lin hejmen. La sekvan tagon Joĉjo ne levis sin; la trian tagon li agonis trankvile sub peco de lana kovrilo.

La hirundoj pepis en la arbusto, kiu staris flanke de la kabano. Sunradio trairis la fenestron kaj ĉirkaŭis per lumo la blondan kape-ton de la knabo, kaj la palan vizaĝeton. Tiu sunradio estis la larĝa vojo, laŭ kiu la animo de la etulo forlasos lin. Estis bone, ke mortante, li povis prezenti al si vojon sunplenan: la vojo de la vivo estis ja tro plena je dornoj. En tiu momento lia brusto leviĝis. Li aŭskultis la voĉojn de la kamparo, kiuj eniris tra la malfermita fenestro. Estis vespere, junaj knabinoj revenis de la falĉado kaj kantis: „Oh he, en la greno verda, oh he, en la greno en flor'.....“ Aŭdiĝis la belsonaj tonoj de fluto, venantaj de la bordo de la rive-reto.

Joĉjo lastfoje aŭskultis la kanton de la kampoj. Sur la kovrilo, antaŭ li, kuŝis lia violono el bretoj. Momenton la vizaĝo de Joĉjo heliĝis kaj tra la palaj lipoj li murmuris. „Panjo?”

„Nu, karulo?” demandis plorante la patrino.

„Panjo, ĉu estas vere, ke la bona Dio en la ĉielo regalos min per violono?”

„Jes, mia filo, jes!” respondis la patrino, sed ŝi ne povis daŭrigi. Preskaŭ sufokiĝante pro larmoj ŝi nur ripetis: „Jesuo, Jesuo!” kaj singultante ŝi falis kun la vizaĝo sur keston, malespere, ĉar ŝi la amatan animon ne povas forteni de la morto.

Kiam la malfeliĉa patrino leviĝis, la okuloj de la eta muzikanto estis malfermitaj, senmovaj. La sunradio malaperis.

Pacon al Joĉjo.

H. Sienkiewicz.

El la itala lingvo trad. PIKILO.

LUDO (Telegramoj).

Ĉiuj havas antaŭ si paperon kaj krajonon. La gvidanto rakontas, ke li ricevis telegramon, kies enhavo estas nur unu vorto, nome „akra”. Ĉiu litero de tiu telegramo signifas verŝajne bonan esperanto-vorton.

Li do petas la ĉeestantojn serĉi la vortojn de tiu telegramo.

Tiamaniere oni akiras diversajn respondojn, kiuj multe amuzas.

La verkinto de l' plej bona frazo ricevas la Nobel-premion (ekz. kuketon), la aliaj ricevas konsolpremion (ankaŭ kuketon).

Kelkaj solvoj por „akra” estas: „Amalio kaj Rudolfo akcidentis”, aŭ: „Akute kaj rapide amu”, ktp. Kompreneble oni povas elekti ĉiujn vortojn, sed komence oni evitu tro longajn.

Buinen (Ned.)



M. MEDEMA.

LA VERDA STELO.

Andante. M. Hankel. Cl. Braun.


La be-la ver-da ste-lo kvi-e-te bri-las jen. Ĝi es-tas al-ta ce-lo, al-lo-gas nin ki-en.

LA SOLVOJ EL NO. 4.



Premiojn ni sendis al:
F.ino Moors, Gemert
(Ned); S.ro Hargaš,
Spiská Nová Ves, (Če-
hosl), F.ino A. Byl, Mid-
delie (Ned).

ENIGMOJ.




a, a, a, a, e, e, h, h, i, i, k, k, l, l,
m, o, o, r, ŭ, ŭ.

La vortoj signifas, horizontale kaj
vertikale: 1. beston, 2. tempon.

a, a, d, d, i, i, m, m, n, n, o, o, o,
o, o, o, t, t, t, t.

La vortoj signifas, horizontale kaj
vertikale: 1. floron, 2. monaton.



Riga (Latv)

B. REICHBERG.

Inter la ĝustaj solvintoj ni disdonos 3 premiojn. Ni akceptos solvojn ĝis
1 Februaro.

Premiojn pro verkaĵoj gajnis: F.ino Marie Louise Stien, Somain (Franc);
F.ino C. E. Koning, Winschoten (Ned). Laŭ deziro de kelkaj abonantoj ni
enpresigas du verkaĵojn laŭ la bildoj en No. 4. „Dramo en triaktoj”.

Ĉiu, kiu varbas 5 novajn abonantojn je nia revuo, ricevos donace jarko-
lekton de „La Juna Vivo”. Do multvalora libro de proksimume 200 paĝoj.

DRAMO EN TRI AKTOJ.

1. La malgranda infano ĝenis hejme pro sia plorado. Tial la patro decidis veturigi lin. Nun la knabeto ridas kaj aspektas tute kontenta. La patro, kiu portas rondan feltoĉapelon, rapidegas.

2. Malfeliĉe, ĉe la angulo de la strato estas domo, kiun la patro bone konas, ĉar li ofte vizitas ĝin. Kvankam tiu patro bone amas sian filon, li tre ofte venas hejmen iom ebria. Ĉu estus eble, ke li preterpaŝu pordon, sur kiun oni skribis: „Drinkejo”? Kiel kutime li eniras tiun domon kaj lasas la infanon en la veturilo ekstere, sur la strato. La minutoj pasas, la infano atendas, sed la patro ne revenas. Post unu glaso malplenigita venis alia kaj ankoraŭ alia..... ktp. Li plezure trinkas la alkoholaĵon, kiu estas tiom malbona por lia bonfarto.

3. Fine li eliras la drinkejon, sed kia li estas! Li ŝanceliĝas, ne plu povas rekte marŝi kaj nur falas en la veturilon. La knabeto estas lerta kaj sprita. La veturilo, kiu utilis por veturigi lin, nun portas..... la patron, kiu sencece parolas, kaj fine ekdormas.

Tre certe la patrino tute agrable akceptos ilin!

Somain (Franc)

M. L. STIEN (14-jara).

DRAMO EN TRI AKTOJ.

Patro sian infaneton

Ĉe la eta-stratangulo

Veturigas tra strateton.

Li fariĝas drinkemulo.

Veturante li revenas

Forte infaneto penas.

Aarhus (Dan)

H. EGERRUP.


ATENTU!!!

El jenaj landoj oni denove rajtas sendi monon eksterlanden: Argentino, Estonio, Finnlando, Japanujo, Ĉinujo, Litovio, Aŭstrio, Polujo, Ĉeĥoslovakujo. Al la abonantoj en tiuj landoj, kiuj ankoraŭ ne pagis sian abonkotizon, ni do afable petas, ke ili baldaŭ sendu la monon!!!

Nova peranto en Jugoslavio estas: S.ro Peter Golobič, Instruisto, Jesenice, Fuzine.

Peranto por Hungarujo estas: Literatura Mondo, Kiadóhivatala, Budapeŝto.

Ni afable petas niajn abonantojn, kiuj abonis la gazeton ekde Januaro, pagi la abonkotizon por la jaro 1937.



LI NE SCIIS ALIAN SOLVON!

Faru verkaĵon laŭ la supraj bildoj, kaj sendu ĝin antaŭ 1 Febr. al: Red. „La Juna Vivo”, West-Graffdyk, Nederlando. La verkintoj de la plej bonaj verkaĵoj ricevos premion.

Estas tre rekomendinde rakonti laŭ la bildoj en la grupkunveno!

LUDO.

Por ekzerci la sufikson „aĵo” la gvidanto povas diri: „Pri kio raportas la gazeto?” La lernantoj respondu per vortoj, kies fino estas „aĵo.” (Novaĵoj, bonaĵoj, laboraĵoj, pentraĵoj, posedaĵoj, manĝaĵoj, kreskaĵoj, ktp.).

POR KOMENCANTOJ.

KRISTFEST-SALUTO.

(Dum la kristfesta soleno envenas iu, vestita kiel kristnasko-viro, portante donaco-sakon, kiu parolas antaŭ la disdono de la donacetoj:)

Kial kun dubema miro
Vi alrigardegas min?
Ke mi la kristnasko-viro
Vere estas, kreu ĝin!

Mia sako ne entenas
Donacaĵojn de valor'
Sed abunde des pli plenas
Bondezire mia kor'.

Nur malmultajn vortojn diras
Mi al vi, geamikar':
„Ĉion bonan mi deziras
Por kristnasko kaj novjar'.

Paco regu sur la tero
Kaj feliĉo super vi!
Kaj la lingvo de l'espero
Vivu, floru kaj pli!

Berlino (Germ)

K. VANSELOW.

PRI DU SVEDOJ.

Ole Bull kaj John Eriksson estis du geniaj svedoj. Ĉi tiuj du viroj estis tre bonaj amikoj dum la juneco, sed poste, kiam unu fariĝis fama violonisto kaj la alia fama inventisto, ili disiĝis.

Ole Bull faris vojaĝon ĉirkaŭ la mondo, kaj li vizitis preskaŭ ĉiujn mondpartojn.

John Eriksson veturis al Nord-Ameriko kaj eklaboris tie por la Nord-Amerika Registaro.

Foje Ole Bull faris koncertojn en Novjorko. Iun tagon li eksciis, ke lia malnova amiko Eriksson sin okupas pri inventaĵoj en la arsenalo de Brooklyn, kaj li decidis viziti lin. La violonisto iris al Brooklyn kaj vere renkontis sian malnovan amikon. La renkontiĝo estis ĝojega. Kompreneble unu rakontis al la alia siajn spertojn.

„Mia kara amiko”, diris Ole Bull, „venu al la koncerto hodiaŭ vespere.”

„Ne, mi ne okupiĝas (okupas min) pri tiaj frenezaĵoj, mi ne ŝatas la muzikon!” respondis Eriksson.

Bull lin petegis veni al la koncerto por aŭdi lian muzikon, sed vane. „Se vi ne venas al la koncerto”, li diris, „mi revenos morgaŭ kun mia violono, kaj mi ludos ĝin ĉi tie.”

„Se vi kunportos vian instrumenton, mi rompos ĝin!” estis la respondo. Eriksson ne iris al la koncerto. La sekvan tagon Ole Bull venis al la laborejo de la inventisto kun sia violono. Eriksson ege koleris. La muzikisto alproksimiĝis al li kaj diris: „Mia kara amiko, mia instrumento faras malbonajn sonojn, kaj ĉar vi komprenas la scion pri sonoj, mi alportas ĝin al vi, por ke vi ekzamenu.”

„Sonigu ĝin do,” diris Eriksson akre.

Bull sonigis ĝin, komence tre delikate, poste pli forte, kaj finfine per sia tuta energio. „Home sweet Home”. („Hejmo, kara hejmo”). Subite dikaj larmoj ekaperis en la okuloj de la inventisto. Li mane prenis la violoniston kaj diris: „Mia kara amiko, daŭrigu, daŭrigu! Vi malkovris en mi novajn sentojn. Mi iros al la koncerto hodiaŭ vespere, kaj eĉ ĉiuvespere!”

El la franca trad. JUSTO ESTAN.

Kie naskiĝis Ole Bull kaj John Eriksson? Kiaj ili estis? Kial la amiko poste disiĝis? Kial Ole Bull multe vojaĝis? Kion faris John Eriksson en N-Ameriko? Ĉu Ole Bull tuj sciis, ke lia malnova amiko loĝas en Brooklyn? Kie la du viroj renkontis unu la alian? Ĉu ili multe rakontis pri siaj spertoj? Kion petis Ole Bull? Kial Eriksson rifuzis viziti la koncerton? Kial Eriksson ege koleris la sekvan tagon? Kion petis Ole Bull de Eriksson? Ĉu Eriksson ekzamenis la violonon? Kiun muzikaĵon ludis Ole Bull? Kiel li ludis? Kia fariĝis Eriksson? Kio okazis? Ĉu Eriksson ŝanĝis sian opinion pri la koncerto de Ole Bull?

Tasko:

- I. Traduku la rakonton en vian gepatran lingvon. Rakontu la enhavon per propraj vortoj.
- II. Lenu parkere „Kristfest-saluto”.
- III. Faru verkaĵon laŭ la bildoj sur paĝo 80.
- IV. Lenu parkere kaj traduku jenajn proverbojn:
Ne juĝu aferon laŭ ĝia ekstero. — Nova balailo bone balaas. — Ĉiu „tial” havas sian „kial”. — Se ne estus „se” kaj „tamen”, mi al ĉio dirus „amen”. — Sidi kiel sur pingloj.

GRAVA SCIIGO.

Antaŭ 5 semajnoj aperis nia „Internacia Lernolibreto”. Jam nun ni vendis pli ol **1000 ekz.** Tiu nombro montras, ke la metodo tre plaĉas al ĉiu, kiu konatiĝis kun ĝi. Kursgvidantoj tuj petu specimenon! Prezo: Nederlando: 0,20 gld.; Usono: 0,15 dol.; Britujo: 6 p; Belgujo: 3 fr; Francujo: 2,5 fr; Svisujo: 0,4 sv. fr; Danujo: 0,50 kr; Ĉeĥoslovakujo: 3,5 Kĉs; Norvegujo: 0,50 kr; Polujo: 0,75 zl.




Foto de nia kunlaboranto Estan, farita en Umea en la norda parto de Svedio. Li biciklis dum la lasta somero 7000 km. en tiu lando.

KION MI NE KREDIS

Multaj estas en la mondo la junuloj, kiuj, sorĉitaj pro legado de aventuraj libroj, kaj vidado de nerealaj filmoj, revas pri grandiozaj vojaĝoj sur nia terglobo. Sed kiam ili grandiĝas kaj ĵom pli profunde ekstudas la efektivigon de la revata mondvojaĝo, ili seniluziiĝas, komprenante, ke tia vojaĝo estas realigebla nur se oni posedas grandan kapitalon, kaj plue konas multajn lingvojn. Mi estis unu el tiuj junaj „Don Kihotoj”, sed mi ne forgesis, ke miaj gepatroj estas simplaj manlaboristoj, kaj sekve malriĉaj. Tial mi tre cerbumis kiel realigi mian fantazian revon.

Sed jen, iun tagon knabo montris al mi la solvon. Li havis belajn eksterlandajn poŝtmarkojn. „Diru, Rafaelo, kiu donis al vi tiom da belaj poŝtmarkoj?”

„Mia patro, kiu ricevas ilin el aliaj landoj.”

„Sed ĉu via patro lernis tiom multajn lingvojn, ke li povas skribi al multaj landoj?”

„Neeee, sed li lernis Esperanton.”

Mi informiĝis, kiel mi povas lerni tiun lingvon, kaj eklernis ĝin.

Poste la scio de Esperanto kuraĝigis min komenci vojaĝon al malproksimaj landoj, kaj mi faris tion bicikle.

Ĉie estas homoj, parolantaj Esperanton. Kun ĉiuj mi interparolis sen malfacilaĵoj. Kaj kio estas la plej mirinda, ĉiuj akceptis la mondvojaĝanton kvazaŭ fraton!

Kiu el vi, karaj junaj amikoj, rifuzos, post legado de ĉi tiu vera rakonto, daŭrigi la studadon de Esperanto?

Originale verkis Justo Estan.

LA DEK NAŬA LECIONO.

A. Varm-iĝ-i — iĝi varma; proksimiĝi — iĝi proksima; ruĝiĝi, verdiĝi, tagiĝo, noktiĝi, an-iĝi, pleniĝi, lumiĝi, saniĝi, blankiĝi, malpuriĝi, malakriĝi, aliĝo, ŝanĝiĝo, ĝojiĝi.

B. Ek-froti, ekdormi, ekvidi, eksidi, ekiri, ekvojaĝi, ekbruli, ekkanti, ekparoli, ekridi, ekplori, ekkrio.

C. HELPU VIAN PROKSIMULON.....

Iam, en la **vintro**, viro transpasis la Alpojn. **Frostegis**, kaj la neĝo malfaciligis la iradon. **Lacega** pro la longa **marŝado** la vojaĝanto deziris **ripozi** momenton. **Tamen** tio estis tre danĝera, pro la akra malvarmo. Dum li eksidis, il piede **tuŝis** homan **korpon**, kiu kuŝis sub la neĝo. Plenkompate li **ekfrotis** la frostajn **membrojn** de la malfeliĉulo, ĝis la preskaŭ **mortanta** homo fine malfermis la okulojn. La vojaĝanto do **savis** homon. Sed pro la longa frotado li **mem** varmiĝis, kaj sekve ankaŭ savis la **propran** vivon.

Parizo (Franc)

LECHELLE.

- a. Kopiu, traduku kaj lernu la novajn vortojn.
- b. Laŭtlegu la lecionon.
- c. Kopiu, traduku A, B, C en vian kajeron.
- d. Rakontu la enhavon de C per propraj vortoj.
- e. Respondu al jenaj demandoj:

Kiam viro transpasis la Alpojn? Kiel li transpasis la Alpojn. Kia estis la vetero? Ĉu la irado estis facila? Ĉu la viro fine estis laca? Pro kio li estis laca? Kial li deziris ripozi? Kial tio estis danĝera? Kia estis la malvarmo? Kion li tuŝis? Kion li faris poste? Ĝis kiam li frotis la membrojn? Kiu fine malfermis la okulojn? Kiu savis homon? Pro kio la vojaĝanto varmiĝis? Kion li ankaŭ savis?

LA DUDEKA LECIONO.

A. **Ploranta** knabo = knabo, kiu ploras; dormanta hundo = hundo, kiu dormas; naĝanta ĉapo = ĉapo, kiu naĝas; parolanta filmo, promenantaj homoj; kantantaj knabinoj, ridantaj buboj, bolanta akvo.

B. Kie estas la ĉapo? — La ĉapo estas en la akvo. Kien falis la ĉapo? La ĉapo falis en la akvon. Kie kuras la muso? La muso kuras sub la divano. Kien kuras la muso? La muso sub la divanon.

Kie promenas la patro? La patro promenas en la ĝardeno. Kien promenas la patro? La patro promenas en la ĝardenon. Kie vi estas? Mi estas en la domo. Kien vi iras? Mi iras en la domon.

Mastrino: Ĉu vi balais la polvon sub la tapiŝo?

Servistino: Komprenoble mi balais la polvon sub la tapiŝon.

C. Uzu en frazoj: En la ĉambro**n**, en la ĉambro; en la korto**n**, en la korto; en la loĝejo**n**, en la loĝejo; sub la tablo**n**, sub la tablo; sur la teleron**, sur la telero.**

D. Urb-ano estas loĝanto de urbo. Vilaĝano estas loĝanto de vilaĝo. Klubano estas ano (membro) de klubo. Nederlando — Nederlandano, ŝipo — ŝipano, Kristo — Kristano, Ameriko — Amerikano. Nia familio havas kvar anojn.

E. LA TRO RAPIDEMA POLICANO.

Policano vidis plorantan knabon sur **ponto** de laĝeto en urba parko. „Kio estas?” demandis la policano.

La bubeto montris al **ĉapo**, naĝanta sur la laĝeto, kaj plor-ĝemis: „Mia **frateto**.....” La policano ne plu aŭskultis. Rapide li demetis la jakon, kaj **vadis** tra la malvarma akvo al la **loko**, kie naĝis la ĉapo. Li **esploris** la akvon ĉirkaŭ si, sed vane. Kun la ĉapo en la mano li revenis al la **bordo**, kaj diris al la knabo: „Mi ne povas trovi vian fraton. Nu, ne ploru, sed rakontu al mi, kie vi staris kiam li falis en la akvon.”

La knabo mire rigardis al la policano kaj diris: „Li ne falis en la akvon, li **trans**-iris la ponton. Mi **volis** rakonti, ke li ĵetis mian ĉapon en la akvon, sed vi ne atendis ĝis mi finrakontis.”

Estonte la policano estis iom malpli rapidema!

Wormer (Ned)

K. STAM.

- Kopiu, traduku kaj lernu la novajn vortojn.
- Laŭtleĝu la lecionon.
- Kopiu kaj traduku A, B, C, D, E en vian kajeron.
- Rakontu la enhavon de E. per propraj vortoj.
- Respondu al jenaj demandoj:

Kion vidis la policano? Kie estis la knabo? Kie estis la ponto? Kion demandis la policano? Al kio montris la knabo? Kio naĝis sur la akvo? Ĉu la knabo ridis? Ĉu la policano longe aŭskultis? Kion li faris? Kien li naĝis? Kion li kunprenis al la bordo? Kion li diris? Kiel rigardis la knabo? Kion li diris pri la frateto? Kiu ĵetis la ĉapon en la akvon? Kia estis la policano estonte?

KORESPONDADRESOJ.

Ĉiu abonanto, aŭ grupo havas la rajton enpresigi unufoje en la jaro senpagan korespondadreson, ne pli grandan ol 2 linioj (por ĉiu plia linio oni aldonu 0,30 gld.).

Danujo: Peder Mortensen, 18 jara, dez. kor. Interesiĝas precipe pri gimnastiko. P. Mortensen, Thorsager.

Danujo: C. H. Lundholm, 20 jara ĝardenisto, dez. kor. Höjskolen, Vestbirck.

Estonio: Divers-aĝaj geesperantistoj dez. kor. interŝ. fotojn, pk. il. gaz., k.ĉ.l. Resp. certa. Esp. Societo, Riia 76, Pärnu.

Finnlando: Esp. Vendredklubo dez. kor. kun eksterlandaj gesamideanoj, ankaŭ kun pli aĝaj. Adr: Instruisto Kivinen, Kouvola.

Francujo: 16 jara junulino dez. kor. kaj interŝ. poŝtk. kun ĉiuj landoj. F.ino R. Dreux, 15 Rue Ste Catherine, Orléans (Loiret).

Francujo: 25 knabinoj, 10—15 jaraj dez. interŝ. leterojn, poŝtk. il. kun ĉiuj landoj. F.ino Lepachelet, Somain (Nord).

Latvuj: F.ino J. Krievs, dez. interŝ. il. poŝtk. kun gesamideanoj el: Afriko, Ameriko, Aŭstralio, Azio. Audeju iela 10—9. Resp. certa.

Latvuj: F.ino E. Lasis, dez. kor. kaj interŝ. ilustr. poŝtk. kun eksterlandaj samideanoj. Krasotaju iela 13—13, Riga.

Latvuj: F.ino M. Mištovt dez. inters. il. poŝtk. kun eksterlandaj samideanoj. Ludzas iela 82—12, Riga.

Latvuj: S.ro Valdis Strazdovskis, skolto, dez. kor. kun Egiptujo, Turkujo kaj aliaj orientaj landoj. Brivibas iela 136—3, Riga.

Latvuj: S.ro A. Krastinš, dez. kor. kaj interŝ. il. poŝtk. kun eksterlandaj gesamideanoj. Aku iela 2—13, Riga.

Latvuj: S.ro G. Sberegajev, dez. kor. kun eksterlandaj samideanoj. Adr: Peipini, p.n.

Nederlando: 13 jara knabo interŝ. glumarkojn kaj il. poŝtk. pri ŝipoj, havenoj, pontoj, k.s. A. v. Hengel, Soesterberg.

Nederlando: 21 jara junulo dez. interŝ. leterojn kaj bildkartojn kun ĉiuj landoj. V. Peerdeman, Venuslaan 112, Enkhuizen.

Svedujo: Instruisto en popola lerneja dez. kor. kun gesamideanoj de ĉie. S.ro Emil Persson, Norra Vram.

Nederlando: Esperanto-klubo kun dek geanoj deziras grupe korespondi pri ĉiuj temoj, k.ĉ.l. S.ro J. Kars, Meent 15, Leerdam.

Francujo: S.ro Miguière dez. interŝ. let. poŝtk., ktp. de lernejo al lernejo (15 geknaboj) en unu koverto. Lernejo, 31 Av. de la République, Igny (G).

Nederlando: 15 jara F.ino dez. kor. kaj interŝ. poŝtm. kun gesamideanoj de ĉie. Adr: F.ino H. Vyver, Rauwerd (Fr.).

Latvuj: S.ro Janis Karelis dez. kor. kaj interŝ. il. poŝtkartojn. Lielgabalū iela 2—4, Riga.

Norveguj: 23 jara F.ino, Mary Slettvoll, e/o Kass. Raaum, Sulitjelma, deziras korespondi kun ĉiuj landoj.

Kiu nun abonas „La Juna Vivo” ricevas la decembran numeron senpage.

RICEVITAJ ESPERANTAĴOJ.

Skriba kurso por diplomoj A kaj B (nur por holandlingvanoj). Gvidanto: la konata kaj sperta instruisto Simon Aarse. Tre rekomendinda metodo por la ned. esperantistoj, kiuj deziras partopreni en la ekzamenoj. Adreso: „La Verda Stelo”, Radioweg 45, Amsterdam (O).

Desegnaĵoj pri Baghy kaj Kalocjsay, faritaj de artisto Stefano Bartha. Haveblaj ĉe Lit. Mondo. Prezo 1 ekz. po 5 dol. cendoj, afrankite.

Esperanto-kalendaro: prezo 1,55 gld., eld. J. Ph. Kruseman, Hago, Kartona plato (18 × 28 cm), sur kiu 26 klaraj folioj, kun bildoj, kun esp. teksto.

Geschiedenis en oplossing van het Wereldtaalvraagstuk: — M. de Waard. Eld. Erven N. Alberts, Kerkrade. 42 paĝoj, form. 15 × 22 cm.

Kalendaraj poŝtkartoj por 1937. Eld. H-E-O, Soesterberg, Nederlando. Prezo: 4 ekz. por gld. 0,12⁵ eksterlanden por 1 resp. kup, afrankite.

Senpagaĵ esperantaĵoj: 1. „**Nia batalado**”, 100-paĝa ilustr. libro pri Litovujo kaj ĝia ĉefurbo Vilnius. Skribu al: Vilniui Valduoti S-ga, Kaunas, Litovujo. 2. „**Ĉeĥoslovakio**”, Bela broŝuro pri la grotoj de la klubo de ĉeĥosl. turistoj, Domic, Jasov kaj Bielská. Havebla ĉe Klub ĉs. turistů, Praha, Ĉeĥoslovakujo.

Pro manko de spaco la korespondado kaj la sciigoj pri la gazeto, kaj aliaj manuskriptoj restis.

Ni ricevis multajn sendaĵojn, kiuj ne interesas al la junularo.

REKLAMTARIFO:

1 paĝo: 15 gld.; ½ paĝo: 8 gld.; ¼ paĝo: 4,5 gld.; ⅛ paĝo: 2,5 gld.

„IDEALA ESPERANTO
BIBLIOTEKO”

eldonas:

BLUA SANGO Willy Wood.

LA MOREA PERLO D. Simson.

IRISIS H. 't Sas.

SUB LA VITRA

KUPOLO L. v. Weddingen.

Ĉiuj interesaj romanoj, 200 p.

Prezo nur po f 0,50.

(plus f 0,20 por sendkosto).

Aĉetante la 3 unuajn ekz. oni pagas nur f 1,35 + f 0,60.

Mendu viajn librojn ĉe la redakcio de „La Juna Vivo”!

SKRIBA KURSO

por A. kaj B.

(nur por holandlingvanoj).

Tre detala B-kurso. Gvidanto

Simon Aarse.

Petu senpagan prospekton. Ĉiu kandidato sukcesis.

La Verda Stelo, Radioweg 45,
Amsterdam-O.

NE FORGESU

ke la binditaj jarkolektoj

de

„LA JUNA VIVO”

estas la plej valoraj kaj malkaraj lernolibroj por Esperantokursoj en ĉiuj landoj

Prezo: 1,6 Sv. fr. = 0,75 gld.

Grupoj kaj abonantoj ricevas rabaton.

Subtenu La Junularlaboron, mendu viajn librojn ĉe la redakcio de „La Juna Vivo”! (Petu senpagan libro-liston!!)

P.E.B.-LIBROJ

bele eldonitaj kaj binditaj
prezo nur 1,75 gld.

LA VIRO EL FRANCUJO

IVANS. Trad. W. V. Grafftdijk.

QUO VADIS (Vol. 1 en k. 2)

H. SIENKIEWICZ. trad. Lidja
Zamenhof.

SI

RIDER HAGGARD. trad.
G. J. Degenkamp.

FANNY

EDNA FERBER. trad. Berno Faber.

RICA KAJ SEN MONO

E. P. OPPENHEIM. Trad. Wadham.

LA ORA STUPARO.

E. P. OPPENHEIM. Trad. Romford
esp. Societo.

LUNO DE IZRAEL

RIDER HAGGARD. Trad.
Payson kaj Butler.

PINOKJO

C. COLLODI. Trad. M. Marchesi.

LA DORMANTO VEKIGAS

H. G. WELLS. Trad. A. F. Milward.

PETROLO (Vol. 1 k. 2)

UPTON SINCLAIR. Trad. W. Bailey.

**LA AVENTUROJ DE MARTENO
DRAKE**

G. Norway. Trad. W. Severn.

Eldonitaj de
THE ESP. PUBLISHING CO. Ltd.

Mendeblaj ĉe:

RED. „LA JUNA VIVO”

KALENDARO POR 1937.

Okaze de Kristnasko aŭ Novjaro sendu viajn bondezirojn per **KALENDARO POSTKARTO POR 1937.**

Klarlegebla, dukolore presita sur bona kartono, ĝi estas ŝatata donaco, kiun la ricevinto volonte uzos tutan jaron. Prezo afrankite 20 ekz. por hgld 0.55; 100 ekz. por hgld 2.20 specimene 4 ekz. por hgld 0.12½ aŭ 1 respondkupon.

Du modeloj haveblaj: No 1101 presita laŭlonge, No 1102 presita laŭlarĝe.

Eldonejo: H.E.O.

Soesterberg — Holando
Poŝtkonto 88015

SCIENCA GAZETO.

Dumonata popolsciencia gazeto il. kun varia enhavo.

Por la jaro 1937a ni faras du plibonigojn de Sciencia Gazeto, kaj ni malaltigas la prezon.

Jarabono por Nederlando: 1,20 gld. Petu senpagan specimenon de la adm: Amerika Esp. Instituto, 1111 Brooke Rd. Rockford, 111., Usono.

Abonebla ĉe „La Juna Vivo”.

STAMPILETOJ

kun 25 diversaj Esperanto-tekstoj hgld 0.20 kaj 0.30 postulu senpagan stampilliston ĉe

H-E-O SOESTERBERG

JARKOTIZO:

Ameriko: 0,70 dol.; **Aŭstrio:** 3,20 ŝil.; **Britujo:** 3 ŝil.; **Belgujo:** 17 fr. fr.; **Bulgarujo:** 50 lev.; **Ĉeĥoslovakujo:** 16,50 Kĉs.; **Danujo:** 3 kr.; **Estonio:** 2,50 est. kr.; **Finnlando:** 30 finn. mk.; **Francaujo:** 10 fr. fr.; **Germanujo:** 2 M.; **Hispanujo:** 5 pes.; **Italujo:** 8,3 ital. lir.; **Japanujo:** 2,50 jap. jen.; **Jugoslavo:** 30 din.; **Latvio:** 2,1 l.; **Norvegualujo:** 2,7 kr.; **Polujo:** 3,6 zl.; **Portugalujo:** 15 port. esk.; **Svedujo:** 2,70 kr.